


# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 8/1982 ★ Kr 6,50

*Nous vivrons d'amour  
et d'espéranto*

LITERATURA  
NUMERO



## Esperantoförbundet

**Adress:** EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38  
Stockholm ★ **Telefon:** 08 -  
11 74 34 ★ EsperantoCentro är  
öppet måndag — torsdag kl. 17  
— 19 ★ **Postgiro:** 20 12-3,  
Esperantoförbundet ★  
**Medlemsavgift:** direktansluten  
medlem 65 kr, ungdomsmedlem  
under 26 år 35 kr,  
familjemedlem (utan tidning) 25  
kr ★ **Prenumerationsavgift** för *La  
Espero* ingår i medlemsavgiften  
★ Medlemmar under 30 år får  
dessutom ungdomsförbundet  
SEJUs blad *ktp*.


## La Espero

Organ för Svenska  
Esperantoförbundet ★ **Adress:**  
EsperantoCentro, Brunnsgatan  
21, 11138 Stockholm ★ **Ansvarig  
utgivare:** Bertil Åkerberg ★  
**Redaktör:** Franko Luin,  
Myggdalsvägen 123, 135 42  
Tyresö, telefon hem 08-712 82 91  
★ **Prenumeration:** 65 kr per år,  
postgiro 20 12-3,  
Esperantoförbundet ★  
Tidningen utkommer med åtta  
nummer per år ★ **Fotosats och  
tryck:** EsperantoCentro,  
Stockholm 1983

## Esperantoförlaget

**Postadress:** Box 7502, 200 42  
Malmö ★ **Besöksadress:**  
Möllevångsgatan 20 B ★  
**Öppettider:** 1 sept — 15 maj:  
onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar  
kl. 17 — 18 ★ Skriftliga  
beställningar expedieras hela  
året, även under sommaren ★  
**Telefon:** 040-12 20 29 ★  
**Postgiro:** 578-5 ★ **Expedition:**  
Wivi Nilsson ★ **Styrelsens  
ordförande:** Anita Lindblom

-Nu, ĉu vi konas pli  
da "rapidaj vojoj"?



# Tage Danielsson: La unua amo

Estis en vespero maja. Ili sidis sur  
kaŝita benko en la parko. Estis en  
la tempo de la jasmenoj. La  
printempo ŝveligis iliajn korojn.

— Neniam antaŭe mi sentis ĉi  
tiel, li flustris. Mi scias, ke sonas  
banale, sed tiel estas.

— Mi ne kuraĝas diri, kiel mi  
sentas pri vi, ŝi diris, rapide,  
antaŭ ol la ruĝiĝo mutigu ŝin. Se  
mi tion dirus, io difektiĝus iel. Ne  
ekzistas vortoj por tio.

Li kisis ŝian vangon singarde.

— Ne faru tion. Vi scias, kion  
mi diris.

Li turnis sin for kaj obstine  
paŭtis:

— Mi volas esti ĉe vi ĉinokte.

— Ne fariĝu tia denove. Vi  
scias, ke mi devas esti hejme je la  
deka. Kial ne sufiĉas al vi, kio  
estas? Kial ni ne daŭrigu ŝati unu  
la alian tiel kiel nun?

— Ŝati! Ĉu tion vi faras, ŝatas!  
Kiel oni ŝatas filmon aŭ fotelon!  
Ŝati!

— Karulo, mi amas vin, vi scias  
tion. Sed ja estas tiel, ke ne eblas.

— Ja estas tiel! Kial devas esti  
tiel? Kial ni ne rajtu ami unu la

alian tute kaj plene? Kial nur ni  
ne? Ĉiuj aliaj ja rajtas. Homoj  
kuŝas ja kiel skatolfiŝoj tra nia  
tuta longa lando. Kial nur mi, kiu  
fine trovis la unuan, solan,  
grandan amon, mi, kiu havas nur  
vin en la tuta mondo, kial ĝuste  
mi ne rajtu?

Ŝi ridetis al lia patoso, rezigne  
kaj iom lace.

— Karulo, vi ja scias, kiel estas.  
Ĉu vi devas detruiri ĉi tutan  
mallongan momenton parolante  
pri tio? Ĉu tio estas la nura, kio  
gravas por vi?

La jasmenoj odoris. Li ekhontis.

— Pardonu al mi. Li karesis  
ŝian vangon. Estas ĉarme esti  
kune kun vi, nur esti proksime al  
vi. Sed kelkfoje sentiĝas aflikte.

La najtingalo trilis. Estis roman-  
tika vespero.

— Sed ion almenaŭ vi devas  
promesi al mi. Promesu al mi, ke  
neniam estos iu alia ol mi.  
Promesu tion!

— Mi promesas. Kiel povus  
esti iu alia? Mi atendis ja nur vin  
dum mia tuta vivo.

— Diru, ke ankaŭ neniam estis  
iu alia. Diru!

— Neniam estis iu alia.

— Diru almenaŭ, ke vi volus,  
ke mi estu ĉe vi ĉinokte.

Ŝi englutis ekploron.

— Karulo, mi volus. Sed nun ni  
devas ekiri. Vi scias, kia bruado  
okazos, se ni revenos hejmen  
post la deka.

Ili leviĝis. Li metis sian brakon  
ĉirkaŭ ŝia talio.

— Ni estas fakte tre infanecaj,  
ĉu ne?

— Mi vere ne scias, ĉu estas  
infanece ami ...

Li rigardis teren kaj diris mal-  
laŭte: — Ci, mi kredas fakte, ke  
la plej bela amo estas tiu, kiu  
neniam povas plenumiĝi. Ni  
estas tamen tre feliĉaj.

Ili ridetis unu al la alia. Estis la  
tempo de la jasmenoj. Estis  
kvarono antaŭ la deka.

Man-en-mane ili eliris el la  
parko kaj promenis al la malju-  
nulejo.

**Tage Danielsson**

*El la sveda tradukis Birger Vigen*

## La libroj

En grandurbo de la nordo estis biblioteko kaj en ĝi multaj libroj eldonitaj en multaj lingvoj. Iun tagon en ĉi tiun urbon venis knabo, kiu ŝatis librojn. Li venis el la sudo kun siaj gepatroj, kiuj jam dum kelkaj jaroj vivis en ĉi tiu urbego. Li kunprenis faskegon da romanoj, poemaroj kaj rakontaroj. La libroj estis la sola pakaĵo, kiun li kunportis. Ĉar li estis unu el tiuj knaboj, kiuj ĉiun tagon tralegas almenaŭ po unu rakonton. Per kio ajn li okupis sin dum la tago, ĉiam restis tempo por tralegi almenaŭ kelkajn paĝojn.

Kaj tiel okazis, ke li tralegis siajn kunportitajn librojn plurfoje, ĉar kromajn li ne povis akiri. En ĉi tiu fremda lando ili nun reprezentis lian naskiĝlokon, urbeton en valo kaj apud rivero, etan lernejan konstruaĵon, kiun li vizitis dum kvar lernojaroj, kaj bibliotekon situanta malantaŭ ombroplena parko, en kiu murmuretis fontano. En la biblioteko li kutimis foliumi bildlibrojn kaj infanperiodaĵojn kaj poste, kiam li scipovis legi, prunteprenadi po unu-du librojn, kiuj ĉiam staris ĉemane en lia ĉambro; eĉ sub la kuseno estis trovebla rakonteto, unu el tiuj, kiu neniam estas je dispono de tiuj, kiuj ne legas librojn nek vivas kune kun ili.

Tiel okazis, ke li forte sopiris al tiu fora biblioteko. Antaŭ liaj okuloj sin prezentis longaj bretoj kun vicoj da titolpaĝoj. Kia beleco vivas tie inter librokovri-  
loj, meditis la knabo, ĝoja je konstato, ke laŭ la kvanto sufiĉas legomaterialo por la tuta vivo. Legado nin kreskigas, kutimis diri la bibliotekistino, la libro nin nutras, ŝi aldonis, kaj ankaŭ tion, ke infanoj, kiuj multe legas, iĝas belaj kaj saĝaj, kaj iam ajn dum la

vivo la famo pri ili certe disvastiĝos ...

En la grandurbo de la nordo estis ankaŭ granda biblioteko, ĝi estis almenaŭ kvinoble pli granda kaj pli riĉa je libroj ol tiu, kiu kuŝis en la urbo de la sudo, kie la knabo naskiĝis. La patrino de la knabo kelkfoje venis en ĝin kaj pruntis kaj legis librojn, eldonitajn en lingvoj, kiujn la knabo ne komprenis, ĉar li scipovis nur sian gepatran lingvon, la lingvon, kiun oni parolas tie fore en la sudo. Traleginte ilin, ŝi rakontis al li la enhavon de la libroj. Sed alies rakontado ne plezurigas nin same, kiel tion faras la propra legado, dum kiu ni konforte haltas, kiam kaj kie ni volas, kaj enpensigante rigardas bildojn kaj scenojn sur la paĝoj. Cetere, antaŭe li ĉiam kutimis legi mem kaj per tio sin amuzi.

Okazis, ke iun tagon li akompanis la patrinon al la biblioteko. La patrinon li petis, ke ŝi demandu la bibliotekistinon, ĉu en la biblioteko ankaŭ troviĝas libroj en la gepatra lingvo. La respondo li atendis kun ia sento de interna tremo. Kaj ĝin li komprenis, malgraŭ tio, ke li scipovis eĉ ne unu vorton de la lingvo, en kiu interparolis la patrino kaj la bibliotekistino.

Ni rigardu — diris la juna blonda virino kondukante ilin ĝis la bretaro, sur kiu staris multaj libroj en diversaj lingvoj. Jen — ŝi diris — jen la libroj, kiujn vi serĉas. Entute nur tri ni posedas. Plurajn ni ne mendis, ĉar ĝis nun neniu demandis pri libroj en via lingvo. Se vi ŝatas multe legi — ŝi direktis sin al la knabo ridetante — ni mendos multajn por vi, ni plenigon la tutan bretaron kaj eĉ la ŝrankon.

Jen ankoraŭ unu speciala numero de La Espero. Kiel estas kutimo jam de pluraj jaroj, la lasta numero de la jaro enhavas beletran legaĵon - sed nun unu tuta numero estas "literatura".

La tradukaĵoj estas diversspecaj por taŭgi al la malsamaj gustoj de la legantoj de La Espero. Vi certe trovos ion taŭgan ankaŭ por vi.

Koran dankon al la tradukintoj pro ilia pacienco: pluraj tradukaĵoj estis pretaj jam de multaj jaroj kaj atendis publikigon. Kaj pliaj daŭre atendas!

La knabo ŝin ne komprenis. En tiu momento li ne komprenus ŝin eĉ se ŝi parolus al li en la lingvo gepatra. Ĉar la ĝojo ekvidi tri novajn librojn en sia gepatra lingvo plenigis lin per entuziasmo! Li ĝojis el la tuta koro pensante pri novaj kaj neaŭditaj mirindaĵoj. Jes, li tralegos ilin, ĉiujn tri, senhalte, dufoje kaj eĉ trifoje, ĝis kiam alvenos aliaj, kiujn la bibliotekistino verŝajne mendos en granda librovendejo tie sude, en la naskiĝlando de la knabo ...

Kaj subite li iĝis tre feliĉa. Lia koro kantis kvazaŭ ĝi estus najtingala. Ankaŭ la libroj estis feliĉaj, plaĉeme ili ridetis, ĉar jen, fine ankaŭ ilin iu serĉas! Ili kredis, ke ĉi tie sur la bretaro inter libroj diverslingvaj ili mortos forgesitaj. Ĉiam ili kutimis malĝoje observadi la alvenon de legantoj, kiuj ĉiam ilin preterpasis. Kaj se iam tamen okazis, ke iu hazarde emanigis ilin, tuj ili estis remetitaj, kiam tiu vidis, ke ili estis eldonitaj en fremda kaj nekomprenebla lingvo. Ili iĝis malgajaj, ili sopirĝemis kaj plendis inter si pri sia amara fato. Ŝajnis al ili, ke la polvo kaj silento neeviteble formangos ilin. Kaj pro tio, ke la knabo ilin ekamis, ilia ĝojo eĉ pligrandigis. Kiel feliĉaj ni estas, la libroj ĝojkriis. Bona knabo, kara leganto nia, al vi ni donacos la plej belajn rakontojn de la tuta mondo, ĉar ni entute ekzistas nur por bonaj geknaboj kaj por ĉiuj, kiuj ŝatas vortojn kaj legadon.

Ŝajnis al ili, ke en la tuta biblioteko, inter miloj da libroj diversspecaj, ne troviĝas unu libro, kiu estas pli ĝoja kaj feliĉa.

Kaj al la knabo ŝajnis, ke en la tuta grandurbo, inter centmiloj da homoj, ne troviĝas eĉ unu persono, kiu ricevis pli belan kaj raran donacon, kaj kies ĝojo superis la alton super la genuoj.

Li apenaŭ povis atendi la momenton, kiam li etendos siajn membrojn en la sofo en sia ĉambreto, enŝaltos la lumon ĉe la kapkuseno kaj ekdronos en dolĉa sorĉaĵo kaj varma flustrado kun la libroj, kiuj babilas nur kun tiuj, kiuj ilin amas kaj legas.

Kaj la legado infanojn kreskigas, kutimis diri bibliotekistino lialingve, ili iĝas belaj kaj saĝaj kaj sur ilia vivovojo neeviteble atendas ilin la famo.

**Ilja Sijarić**

*El la serba tradukis Zora Heide*

## Herta Wirén: Panpeco kun Anna

Ŝi estis sesjara, kiam ŝi travivis la miraklon. Ŝi neniam forgesis tion. Oni nomis ŝin "Beko", ĉar ŝi sin miksis en ĉion kaj havis respondon je dispono kaj klare diris sian opinion, kiam io ne plaĉis al ŝi. Sed tiun tagon oni simple silentigis ŝin.

Por la unua fojo ŝi estis tute ekster tio, kio okazis, kaj ne komprenis, kion tio signifas. La patrino staris tenante sin je la litekstremo, tordis sin kaj havis dolorojn. La patro kuris ĉirkaŭen serĉante sian kalkmakulitan masonistan ĉapon kaj poste forrapidis sen stari antaŭ la spegulo en la halo, kiam li surmetis ĝin. Kaj li, kiu estis tre silentema, kriis, ke li venigos "la virinon".

La plej maljuna fratino de Sofia irigis la grandfraton Sigge al la lernejo. Kaj Gerda akompanis Andreas al la ŝuriparista paro, geonkloj Lars kaj Elin. Sofio puŝis Elsan eksteren sur la ŝtuparon kaj diris, ke ŝi forestu, ĝis kiam oni alvokos ŝin. Ŝi ĵetis al ŝi la mantelon kaj la ĉapon kaj siblis:

— Kuru en la korton, mi diras, kaj restu tie, ĝis kiam oni alvokos vin. Tio okazis ĝuste kiam "la virino" supreniris la ŝtuparon afable salutante al Elsa, kiu nur fiksigardis ŝin kaj ŝian nigran valizon. Kion ŝi povus havi en la valizo. La patro ne kunestis, do li verŝajne estis irinta al la konstrulaborejo kiel kutime. Se nur la virino volus rapidi iom, ĉu ŝi ne komprenis, ke la patrino estas malsana.


—Kaj se mi faris eraran numeron, kial vi respondis?

En la vestiblo estis trankvile kaj sekure, kvankam la pordo al la kelŝtuparo klakis kaj la vento fajfante ensiblis tra la spaco inter la ŝtonplanko kaj la ekstera pordo. Ŝi sidis sur la ŝtuparŝtono kun bona konscienco. La aliajn tagojn tio estis malpermesata — sed hodiaŭ ne estis kiel dum la aliaj tagoj.

Elsa sidis premante bulojn de argilo, kiujn ŝi duonmeĥanike formis en bulkojn kaj panojn kaj vicigis sur la ŝtupon. Ne eblis ŝajnigi ion hodiaŭ. La bulkoj ja estis nur argilo kaj la sekvinberoj estis ŝtonetoj. Ŝi sidis kvazaŭ letargie, rigida pro malvarmo. Kio estis tiel stranga pri la nigra valizo, kiun la virino estis portanta? Pri kio ĝi memorigis — jes, pri Gunni Nicklasson, kiu iun tagon diris, ke ili ricevis sian malgrandan fratinnon de virino, kiu alportis ŝin en nigra valizo. —

Ne, vi mensogas, Elsa estis respondinta, sed tamen ŝi sentis sin malcerta kaj malsekura. Kelkfoje ŝi estis demandinta sin, de kie venas la etaj infanoj, sed ĉiam io malhelpis, kiam ŝi volis demandi al panjo. Sed tiun fojon ŝi ekkuris de Gunni kaj suprenkuris al panjo kaj diris senspire, serioze kaj rekte: — Panjo, kiel vi ricevis min?

Panjo vere ekhaltis. La fenestro estis malfermita kaj panjo staris ĉe la kuireja, elverŝujo senŝeliganta terpomojn, ŝi hezitis momenton antaŭ ol ŝi turnis sin al Elsa, kiu staris tiel streĉita,



plena de sankta sciavido, kaj tiam la vero elglitis el ŝi: — Vi venis el mi.

De ne estas vere, ke Gunni ricevis sian etan fratinton de virino, kiu prenis ŝin el la Saliklaĝetoj? — Ne, respondis panjo tute simple, kaj aldonis kvazaŭ por malhelpi al Elsa fari pluajn demandojn: — Malsuprenkuru kaj ludu ankoraŭ iom da tempo. Ni baldaŭ tagmanĝos.

Elsa sin frotis kontraŭ la jupo de panjo, kontenta pri la klara respondo. Ŝi denove kuris malsupren, ŝteliris sur la grundon de Nicklasson por senĝene cerbumi. Tia estis la afero. Infanoj, etaj vivantaj infanoj, ne povas elveni el nenio. Ne per cikonio kaj ne el la Saliklaĝetoj. Ĉi tie malantaŭ la malnova lignoamaso Elsa eltrovis, ke ŝi ĉiam sciis pri tio. Sed tio estis kaŝita interne de ŝi, ĝis kiam panjo elvokis la ĝustan respondon.

Ŝi sidis sur la ŝtuparo kaj sentis, kiel ŝi malvarmas. Pordo malfermiĝis kaj fermiĝis de iu tie supre kaj la maljuna sinjorino Rössel lamiris malsupren en la ŝtuparo. Ŝi estis afabla kaj parolema kaj ŝi ŝatis Elsan. De tempo al tempo ŝi invitis ŝin kaj montris bildojn el Ameriko. Elsa leviĝis kaj preparis sin por saluti tute gracie. Eble ŝi rajtos eniri ĉe sinjorino Rössel. Ŝi forgesis la bulkojn kaj panojn kuŝantaj meze de la ŝtupo.

— Kial vi sidas ĉi tie kaj malpurigas la ŝtuparon? Tio ne estas ludejo, kolere diris sinjorino Rössel kaj piedbatis la rubaĵaron, tiel ke la argilbuloj ĉirkaŭflugis kaj poste ŝi plulamiris malsupren en la kelon kun sia karbositelo, murmuranta ion pri homoj, kiuj venigas en la mondon pli da infanoj ol ili kapablas teni puraj.

Elsa sin premis kontraŭ la muro, senmova kaj nekompreneanta. Ŝi ja tiel ofte estis ludanta sur la ŝtuparo kaj sinjorino Rössel ne fariĝis kolera. Ŝi rigardis siajn argilŝmiritajn manojn kaj palpis sian vizaĝon. Malpura — ĉu ŝi kulpis — ĉio estis maljusta. Ŝi preskaŭ estis preta kuri malsupren en la kelon al sinjorino Rössel por klarigi, sed io ŝin malhelpis. Tio, kion sinjorino Rössel diris, kvankam ŝi ne komprenis la vortojn, la tono kaj la kolera rigardo pikis. Estis malice dirite pri panjo — same kiel tiam, kiam Gunni ekkriis, "vi ne havas belajn tapiŝojn, nur ĉifontapiŝojn eehhh".

Stria en la vizaĝo pro larmoj kaj argilo ŝi kunkolektis la argilbulojn, kuris sur la straton kaj ĵetis ilin en la stratan defluejon, turnis sin malrapide kaj supreniris la ŝtuparon por aŭskulti ĉe la pordo. Sed tie staris "la virino" fermanta sian nigran valizon, kaj parolis kun Sofia. Ili aspektis tiel kontentaj, ke la kuraĝo de Elsa altiĝis. Panjo certe estis sana nun. La virino karese frapetis ŝin.

— Vi estas brava knabino. Tion mi vidis la unuan fojon, kiam vi malfermis la okulojn. Sofia varmigis ŝiajn malvarmajn manojn.

— Vi certe malsatas. La kaĉo tuj estos preta. Mi lavos vin, poste vi eniru al panjo. Mi povas diri al vi, ke ni havas ion belan por montri al vi.

Sed Elsa ne povis forgesi tion, kion sinjorino Rössel estis dirinta.

— Sinjorino Rössel iris malsupren en la ŝtuparo kaj fariĝis tre kolera, ĉar mi ludis tie, kaj diris, ke ni havigis al ni pli da infanoj ol ni kapablas teni puraj.

— Ĉu ŝi vere diris tion! Ni havas tiom da infanoj kiom ni volas, sen demandi al sinjorino Rössel.

Agrable malpeziĝis, kiam la pli aĝa fratino defendis panjon. Ĉio nun estis tiel bona. La agrabla varmo elfluis el la kuireja kame-

no. La kaĉo, kiu vaporis en la bolpoto. Ŝia propra blua telero kaj glaso sur la vakstuko. Ĉiuj tiuj ordinaraj objektoj, kiujn ŝi kutime ne rimarkis, sentiĝis belaj kaj sekuraj. Nur la fermita pordo ankoraŭ maltrankviligis ŝin.

Sofia singarde malfermetis la pordon de la ĉambro kaj diris mallaŭte:

— Ĉu panjo dormas?

Elsa staris plena de atendo — de io, kion ŝi ne povis klarigi al si mem, sed ŝi antaŭsentis ion neesprimeblan kaj aŭdis la voĉon de panjo.

Elsa restis momenton sur la sojlo kaj rigardis en la ĉambron. Panjo kuŝis en la granda etendebla lito, pala kaj senmova, sed tamen luma. La hararo, kutime tufa, estis malseketa kaj kuŝis glate forŝovita de la blanka frunto. La mano de panjo, kun la ringoj maldikaj de uzado, kuŝis sur la nova ŝtofpeca kovrilo, kaj ŝi havis belan litotukon kun larĝaj punktoj. La ovala tablo, kiu dumtage staris antaŭ la sofo, estis metita ĉe la fenestro. La kurtenoj estis duone tirfermitaj. Inter ili staris la lilio, floranta. Hieraŭ nur panjo miris, kiun tagon ĝi ekfloros. La sangruĝa kaliko estis subtenata de fiera trunketo. Sed la folioj kliniĝis gracie, kvazaŭ ili estus imponegataj de la beleco

## 1983-års stad är Budapest!

1983-års internationella esperantokongress kommer att äga rum i Budapest i Ungern. Det är klart att du ska vara med! Gör slag i saken redan i år — det tjänar du på! Den 1 januari kommer dessa avgifter att gälla:

1 Icke medlem i UEA	560 kr
2 Medlem med årsbok	495 kr
3 Medlem med årsbok och 'esperanto'	390 kr
4 Make/maka till 1.	395 kr
5 Make/maka till 2 eller 3	350 kr
6 Ungdom t o m 20 år	170 kr
7 Heltidsstuderande t o m 30 år	280 kr
8 Synskadad	225 kr

Beställ anmälningsblankett från Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040-91 63 09. Blanketten ska tillbaka till samma adress, ifylld.

Du betalar till postgiro 1474295, Esperantoförbundet, Specialkonto.

de la floro. Neniam antaŭe sentiĝis tiel solene en la ĉambro.

— Venu, Beketo, panjo vokis karese. Elsa heziteme paŝis al la lito. Sed ŝi ne kuraĝis iri tute proksimen. Ŝajnis, ke patrino ne estas tute reala. Ŝi sendis time-man, eviteman rigardon al panjo. Tiam panjo ridetis kaj levis angulon de la kovrilo kaj diris kvazaŭ pardonpetante:

— Estas via fratineto. Ĉu vi ĝojas pri ŝi?

Elsa ektemis antaŭ la miraklo kaj jesflustris. Sed malklara doloro leviĝis kiel ondo kaj preskaŭ blindigis ŝiajn okulojn. Ŝi sentis kvazaŭ maljustaĵo estis farita al ŝi. Ŝi volis mem kuŝi tie sur la brako de panjo kaj premi la kapon kontraŭ ŝia brusto kaj esti malgranda kaj ne granda brava knabino. Tiam ŝi sentis, kiel panjo karesis ŝian hararon kaj kondukis ŝin trans la profunda fendo, kiu komencis kreski inter ŝi kaj panjo.

— Infano mia, iru ĉirkaŭen al la alia flanko. Deprenu viajn ŝuojn kaj prenu la lankovrilon, kiu kuŝas ĉe la piedparto, kaj metu ĝin ĉi tien, kaj poste rampu supren al panjo. Sed kuŝu tute kviete, ĉar panjo estas tre laca.

Kiam Sofia eniris, ĉiuj tri estis bone dormantaj.

**Herta Wirén**

*El la sveda tradukis Vivi Couppez*

## Tove Jansson: La nevidebla infano

lun malhelan kaj pluvan vesperon la familio sidis ĉirkaŭ la veranda tablo kaj purigis fungojn. La tuta tablo estis kovrita per gazetaj paperoj kaj en la mezo ili estis metintaj la petrolan lampoon. Sed la anguloj de la verando estis en ombro.

Mu denove rikoltis amaragari-kojn, diris la paĉjo. Pasintjare ŝi rikoltis muŝagarikojn.

Ni esperu, ke estos kantareloj venontjare, diris la panjo. Aŭ almenaŭ vinrusuloj.

Estas bone neniam perdi la esperon, rimarkigis eta Mu kaj ridkluketis por si mem.

Ili plupurigadis en paca silento.

Subite aŭdiĝis kelkaj frapetoj sur la fenestro kaj sen atendi Totiki enpaŝis sur la verandon kaj forskuis la akvon de sur sia pluvmantelo. Poste ŝi tenis la pordon malfermita kaj logvokis en la pluvon: Venu, venu.

Kiun vi kunhavas, demandis la mumintroleto.

Ninni, diris Totiki. La ido

nomiĝas Ninni. Ŝi daŭre tenis la pordon malfermita kaj atendis. Neniu venis.

Nu ja, diris Totiki kaj levis la ŝultrojn. Ŝia ja povas resti ekstere, se ŝi timemas.

Sed ĉu ŝi ne malsekiĝos, demandis la panjo de la mumintroleto.

Mi ne scias, ĉu tio tre gravas, kiam oni estas nevidebla, respondis Totiki kaj venis al la tablo kaj sidiĝis. La familio ĉesis purigi kaj atendis klarigon.

Vi ja scias, ke oni facile fariĝas nevidebla, se oni estas timigita sufiĉe ofte, diris Totiki kaj formangiŝis ovfungon similan al agrabla neĝbuleto. Nu ja. Tiu ĉi Ninni estis timigita en misa maniero de onklino, kiu estis prizorganta ŝin sen ŝati la idon. Mi renkontis la onklinon kaj ŝi estis terura. Ne kolera, vidu, ion tian oni povas kompreni. Ŝi estis nur fridega kaj ironiema.

Kio estas ironiema, demandis la mumintroleto.


Nu, imagu, ke vi stumblas sur glufungo kaj falsidiĝas meze sur la purigitajn fungojn. Estus kompreneble nature, se via panjo koleriĝus. Sed tute ne, tion ŝi ne faras. Anstataŭe ŝi diras, fride kaj humilige: Mi ja komprenas, ke tio estas via ideo pri dancado, sed mi estus danka, se vi ne farus tion en la manĝaĵo. Tiel, proksimume.

Fi, kiel malagrabla, diris la mumintroleto.

Jes, ĉu ne, konsentis Totiki. Kaj ĝuste tiel faris ĉi tiu onklino. Ŝi ironiis de mateno ĝis vespero kaj fine la ido komencis paliĝi je siaj konturoj kaj nevidebliĝi. Pasintvendrede ŝi tute ne videblis plu. La onklino donis ŝin al mi, dirante, ke ŝi vere ne povas prizorgi parencojn, kiujn ŝi eĉ ne povas vidi.

Kaj kion vi faris al la onklino, demandis Mu kun elstaraj okuloj. Vi ja certe draŝis ŝin?

Ne penvaloras al ironiuloj, diris Totiki. Mi kunprenis Ninni hejmen. Kaj nun mi venigis la idon ĉi tien, por ke vi revidebligu ŝin.



Estiĝis paŭzeto.

Nur la pluvo susuris sur la veranda tegmento. Ĉiuj fiksrigardis al Totiki kaj pensis.

Ĉu ŝi parolas, demandis la paĉjo.

Ne. Sed la onklino ligis tintilon ĉirkaŭ ŝia kolo por scii, kie ŝi troviĝas.

Totiki ekstaris kaj remalfermis la pordon. Ninni! ŝi vokis en la mallumon.

La freŝa kaj malvarmaodoro de aŭtuno envenis sur la verandon kaj rektangulo de lumo ekfloris sur la malseka herbejo. Post momento tintilo eksonis ekstere, hezite — la sono supreniris la ŝtupojn kaj silentiĝis. En la aero je ioma alto super la planko pendis arĝenta tintilo de nigra rubando. Ninni devis havi tre maldikan kolon.

Jes ja, diris Totiki. Jen do via nova familio. Iom frenezetaj kelkfoje, sed entute sufiĉe bonintencaj.

Donu seĝon al la ido, diris la paĉjo. Ĉu ŝi scias purigi fungojn?

Mi nenion scias pri Ninni, certigis Totiki. Mi nur venigis ŝin ĉi tien. Nun mi havas iom da alio por prizorgi. Vizitu min iun tagon kaj rakontu, kiel la afero iras. Ĝis la.

Kiam Totiki estis irinta, la familio sidis tute silenta kaj fiksrigardis al la vaka seĝo kaj arĝenta tintilo. Post momento unu el la kantareloj subite leviĝis en la aeron. Arbpingloj kaj tero degratiĝis de nevideblaj manetoj kaj fine la fungo distranĉiĝis en pecetojn kaj ŝvebis en la poton. Nova fungo ekŝvebis en la aero.

Ekscite! diris Mu imponita. Provu doni al ŝi ion por manĝi. Mi ŝatus vidi, ĉu videblas, kiam tio eniras la stomakon.

Ĉu iu povus diri, kiel oni revidebligu ŝin, la paĉjo diris en zorgo. Ĉu oni devus iri al kuracisto?

Tion mi ne kredas, diris la panjo. Eble ŝi kelkan tempon volas esti nevidebla. Totiki diras, ke ŝi estas timema. Mi opinias, ke ni preferu lasu la idon trankvila, ĝis ni ion pli bonan elpensos.

Kaj tiel estis.

La panjo ordigis liton al Ninni en la orientflanka mansardo, kiu okaze estis malplena. La arĝenta tintilo sonis post ŝi, kiam ŝi supreniris la ŝtuparon, ĝi rememorigis al la panjo pri la kato, kiu iam loĝis ĉe ili. Apud la lito la panjo vicigis pomon, glason da

suko kaj tri striajn bombonojn, kiuj estis disdonataj al ĉiu je vesperiĝo. Poste ŝi lumigis kandelon kaj diris: Ninni dormu nun. Dormu kiel eble plej longe. Mi metos la matenan kafon sub la kruĉoĉapon, por ke ĝi restu varma. Kaj se Ninni ektimiĝos aŭ ion volos, nur malsuprenvenu kaj tintu.

La panjo vidis la litkovrilon leviĝi kaj kurbigi al tre malgranda altaĵo. Fariĝis kavo en la kuseno. Ĉi malsupreniris al sia ĉambro kaj elserĉis la malnovajn notojn de sia avinjo pri Ĉiamefikaj Kuracajoj. La okulo de malico. Rimedo kontraŭ melankolio. Malvarmumo. Ne. La panjo serĉis kaj foliumis. Fine ŝi trovis notaĵon en la fino, kiun avinjo estis farinta, kiam ŝia skribo jam estis sufiĉe trema. "Se la konatoj iĝas nebulecaj kaj malfacile videblaj". Nu ja. Bonŝance. La panjo tralegis la recepton, kiu estis sufiĉe komplika. Poste ŝi komencis miksi kuracilon por eta Ninni.

La tintilo malsuprentintis la ŝtuparon, paŝope, paŭzeto antaŭ ĉiu paŝo. La mumintroleto aten-

dis ĝin jam la tutan matenon. Sed ne estis la arĝenta tintilo, kiu estis plej ekscita hodiaŭ. Estis la piedetoj. La piedetoj de Ninni, kiuj venis paŝante malsupren de la ŝtuparo, tre malgrandaj kaj kun timemaj piedfingretoj, kiuj dise kunteniĝis. Videblis nur la piedetoj kaj tio aspektis terura.

La mumintroleto kaŝis sin malantaŭ la kahela forno kaj rigardegis sorĉita al tiuj piedetoj elirantaj sur la verandon. Jen ŝi trinkis kafon. La taso leviĝis kaj malleviĝis. Ŝi manĝis buterpanon kun konfitaĵo. La taso elŝvebis de si mem en la kuirejon kaj laviĝis kaj metiĝis en la ŝrankon. Ninni estis tre ordema infaneto.

La mumintroleto elkuregis en la ĝardenon kaj kriis: Panjo! Ŝi ekhavis piedetojn! La piedetoj videblas!

Tion mi ja konjektis, pensis la panjo en pomarbo. Avinjo certe scias, kion ŝi faras. Estis ja sagace miaflanke miksi la kuracilon en la kafon de Ninni.

Bonege, diris la paĉjo. Kaj eĉ pli bonos, kiam ŝi montros la nazon. Iel min deprimas babili kun tiuj, kiuj ne videblas. Kaj ne



Har du en vän som behöver bli påmind om esperanto några gånger per år? Behöver dina politiker en påminnelse eller en första information? Finns det en anslagstavla eller ett kaffebord på din arbetsplats, där ett litet blad kan få plats? Prenumerera på ESPERANTONYTT: Det kostar bara 8 kronor för fyra nummer. Postgironr 20 65 88-6, Esperantonytt. Rabatt vid mängdbeställningar. Ring 08-712 82 91 för besked.

respondas.

Cit, diris la panjo averte. La piedetoj de Ninni staris en la herbejo inter la defalintaj pomoj.

Saluton Ninni, kriis Mu. Kiel porkido vi dormis. Kiam vi montros la nazon? Oni supozus, ke vi aspektas malbelega, ĉar vi nevidebligas vin.

Silentu, flustris la mumintroleto, ŝi vundiĝas. Li iris al Ninni en afekta komplezo kaj diris:

Ne atentu pri Mu. Ŝi estas durulino. Ĉi tie ĉe ni vi estas tute sekura. Vi eĉ ne pensu pri tiu fionklino. Ŝi ne povas veni vin forpreni ...

En la sama momento ekpaliĝis la piedetoj de Ninni kaj oni apenaŭ povis distingi ilin en la herbejo.

Kara, vi estas azeno, diris la panjo kolerete. Vi ja devus kompreni, ke oni ne memorigu al la ido pri tio. Rikoltu pomojn kaj ne stultumu.

Ili rikoltis pomojn.

La piedetoj de Ninni iom post iom renetiĝis kaj grimpis sur arbon.

Estis bela aŭtuna mateno, en la ombro malvarmis al la nazo, sed en la sunbrilo estis preskaŭ somero. Ĉio malsekis post la nokta pluvo kaj havis fortajn kaj brilajn kolorojn. Kiam ĉiuj pomoj estis deplukitaj (aŭ deskuitaj), la paĉjo elportis la plej grandan pomomuelilon kaj ili komencis fari kompton.

La mumintroleto turnis la krankon kaj la panjo replenigadis kaj la paĉjo alportis konfitujojn sur la verandon. Eta Mu sidis en la arbo kantante La Grandan Pomhimnon.

Subite ektintegis.

Meze sur la ĝardena pado kuŝis granda konfitaĵamaso, tute dorna per vitraj fragmentoj. Kaj apud ĝi la piedetoj de Ninni, kiuj rapide paliĝis kaj malaperis.

Ja jes, diris la panjo. Jen ĝuste tiu ujo, kiun ni kutimas doni al la burdoj. Nun ni ne bezonos porti ĝin al la herbejo. Kaj avinjo ĉiam diradis, ke se kresku el la tero, oni donacu al ĝi en la aŭtuno.

La piedetoj de Ninni reaperis kaj super ili du maldikaj kruroj. Super la kruroj malklare duonvidiĝis bruna roborlo.

Mi vidas ŝiajn krurojn, kriis la mumintroleto.

Gratulon al vi, diris eta Mu kaj malsuprenrigardis de la pomarbo. Sed kial vi tabakbrune vestiĝas, tion scias nur la Hororulino.

La panjo kapjesis al si mem kaj pensis pri sia saĝa avinjo kaj ŝia kuracilo.

Ninni paŝetis post ili la tutan tagon. Ili alkitimiĝis al la tintilo, kiu sekvis ilin kaj ne plu trovis Ninni tiel rimarkinda.

Vespere ili estis preskaŭ forgesintaj ŝin. Sed kiam ĉiuj estis enlitiĝintaj, la panjo elprenis rozruĝan ŝalon el sia kesto kaj kudris etan robon. Kiam ĝi estis preta, ŝi suprenportis ĝin al la orientflanka mansardo, kie la lumo estis estingita, kaj etendis ĝin singarde sur seĝon. Poste ŝi orlis larĝan harrubandon el la restanta ŝtofo.

La panjo terure amuziĝis. Estis kiel se ŝi denove kudrus pupvestetojn. Kaj plej komike estis, ke oni ne sciis, ĉu la pupo havas helan aŭ malhelan hararon.

La sekvantan tagon Ninni portis la robon. Ŝi estis videbla

ĝis la kolo, malsuprenvenis al la matena kafo kaj pepis:

Koran dankon.

La familio tute konfuziĝis kaj tiel ĝeniĝis, ke ili ne sciis kion diri. Kaj cetera oni ne bone sciis kien rigardi parolante kun Ninni. Oni provis kompreneble fiksi la rigardon iom super la tintilo, kie oni supozis, ke ŝi havas siajn okulojn. Sed subite la rigardo malsuprenlitis kaj fiksiĝis sur io, kio videblis. Kaj tiam oni sentis sin malĝentila.

La paĉjo klarigis sian voĉon. Estas ĝojige vidi, li komencis, ke eta Ninni hodiaŭ pli videblas. Ju pli oni vidas, des pli oni ĝojas ...

Mu ridis laŭte kaj frapis la tablon per kulero. Bone, ke vi ekparolis, ŝi diris. Se vi havas ion por diri. Ĉu vi konas iun bonan ludon?

Ne, pepis Ninni. Sed mi scias, ke ekzistas tiuj, kiuj ludas.

La mumintroleto estis ravita. Li decidis lernigi al Ninni ĉiujn ludojn, kiujn li konas.

Post la kafo ĉiuj tri iris al la rivero kaj ekludis. Sed Ninni montriĝis tute senesperiga. Ŝi riverencadis kaj genufleksis kaj diris serioze ho jes kaj kiel agrable kaj vi pravas, sed oni sentis klare, ke ŝi ludas pro ĝentileco kaj ne por amuziĝo.

Nu, sed kuru do! kriis Mu. Ĉu vi eĉ ne scias salti!

La magraj kruroj de Ninni kuris kaj saltis obeeme. Poste ŝi denove staris senmova kun pendantaj brakoj. La malplena kolumo super la tintilo aspektis strange senhelpa.

Ĉu laŭdojn vi atendas! kriis Mu. Ĉu nenian viglon vi havas! Ĉu vi volas, ke mi draŝu vin?

Prefere ne, Ninni pepis humile.

Ŝi ne kapablas ludi, murmuris la mumintroleto kaj estis konfuzita.

Ŝi ne kapablas koleriĝi, diris eta Mu. Jen ŝia manko. Aŭskultu, daŭrigis Mu kaj iris tute proksime al Ninni kaj alrigardis ŝin minace, vi neniam akiros propran vizaĝon, antaŭ ol vi lernos lukti. KREDU MIN.

Ho jes, konsentis Ninni kaj regredis singarde.

Okazis nenia pliboniĝo.

Fine ili ĉesis provi lernigi al Ninni kiel ludi. Ankaŭ amuzajn anekdotojn ŝi ne ŝatis. Ŝi neniam ridis je la ĝusta loko. Ŝi entute neniam ridis. Kaj tio deprimis la rakontanton. Oni do lasis ŝin



-Ne, filo mia, paĉjo ne scias ĉion.



trankvila.

La tagoj pasis kaj Ninni estis daŭre sen vizaĝo. Ili al kutimiĝis vidi ŝian rozruĝan robon sekvi la panjon de la mumintroleto. Tuj kiam la panjo haltis, la tintilo ĉesis soni, kiam ŝi removiĝis, ĝi reektintis. En la aero iom super la tintilo balancetis rozruĝa banto. Aspektis iom strange.

La panjo daŭre verŝadis la kuracilon de avinjo al Ninni, sed nenio okazis. Ŝi do lasis tion pensante, ke multaj ja prosperas sen kapo kaj ke eble Ninni ne estas tre bela.

Ĉi tiel ĉiu devis mem imagi ŝian aspekton, kaj tio iam povas pliekscitigi konatecon.

Unu tagon la familio iris tra la arbaro al la strando por elakvigi la boaton antaŭ la vintro. Ninni laŭkutime posttintis ilin, sed kiam ili alvenis al la maro, ŝi abrupte haltis. Ŝi surventriĝis sur la sablo kaj komencis plorpepi.

Kio okazas al Ninni? Ĉu ŝi ion timas? demandis la paĉjo.

Eble ŝi neniam antaŭe vidis la maron, diris la panjo. Ŝi kliniĝis kaj flustris kun Ninni. Poste ŝi rerektiĝis kaj diris:

Ne, estas la unua fojo. Ninni opinias, ke la maro estas tro granda.

Multajn idiotajn idojn mi renkontis, komencis eta Mu, sed la panjo alrigardis ŝin severe kaj diris: idiota vi mem povas esti. Nun ni elakvigu la boaton.

Ili suriris la varfeton al la banbudo, en kiu loĝis Totiki, kaj frapis la pordon.

Saluton, diris Totiki. Kiel fartas la nevidebla infano?

Mankas nur la nazo, diris la paĉjo. Ĝuste nun ŝi estas iom agitata, sed tio certe pasos. Ĉu vi povus iom helpi pri la boato?

Ja kompreneble, diris Totiki.

Kiam la boato estis elakvigita kaj kuŝis kilalsupre, Ninni jam iris ĝis la akvo kaj staris senmova sur la malseka sablo. Ili lasis ŝin trankvila.

La panjo sidiĝis sur la varfeto kaj rigardis en la akvon. Fi, kiel malvarma ĝi ŝajnas, ŝi diris. Kaj post tio ŝi iom oscedis kaj aldonis, ke jam delonge nenio ekscita okazis.

La paĉjo palpebrumis petole al la mumintroleto, faris teruran grimacon kaj komencis malrapide kaj ŝtele proksimiĝi al la panjo de malantaŭe.

Li kompreneble ne intencis ĵeti ŝin en la akvon, kiel li kutimis

fari, kiam ŝi estis juna. Eble eĉ ne timetigi ŝin, sed nur iom amuzi la idojn.

Sed antaŭ ol li atingis ŝin, aŭdiĝis kriego, ruĝa fulmo superflugis la varfeton, la paĉjo ekkriis plengorge kaj faligis sian ĉapelon en la akvon. Ninni estis borinta siajn nevideblajn dentojn en la voston de la paĉjo, kaj ili estis akraj.

Brave, brave! kriis Mu. Mi mem ne pli lerte agus!

Ninni staris sur la varfeto kun kuspetnaza, kolera vizaĝeto sub rufaj fruntharoj. Ŝi siblis al la paĉjo kiel kato.

Ne audacu ĵeti ŝin en la grandan teruran maron! ŝi kriis.

Ŝi videblas, ŝi videblas! kriis la mumintroleto. Ŝi ja aspektas ĉarma!

Ĉu ĉarma, diris paĉjo ekzamenante sian morditan voston. Ŝi

estas la plej stulta, fifreneza, plej mise edukita infano, kiun mi iam renkontis, kapa-senkapa.

Li kuŝiĝis sur la varfeto kaj provis elfiŝi la ĉapelon per bastono. Kaj iel li deglitis kaj falis surkapen en la akvon.

Li elmergiĝis tuj, staris sur la fundo kun la nazo super la akvo kaj la oreloj estis plenaj de ŝlimo.

Ho! kriis Ninni. Kiel ridige! Kiel amuze!

Laŭdire ŝi neniam ridis ĝis nun, diris Totiki mirigita. Ŝajnas al mi, ke vi tiel ŝanĝis la idon, ke ŝi pli teruras ol eta Mu. Sed plej grave estas ja, ke ŝi videblas.

Tio estas nur dank'al avinjo, diris la panjo.

Tove Jansson

El la sveda tradukis Per-Aarne  
Fritzon

## Viktor Rydberg: Singoalla

lun somertagon okazis, ke Erland revenis el ĉasiro.

Sur la supro de altaĵo en la arbaro kreskis piceo, juna kaj svelta, sed pli alta ol ĉiuj ĉirkaŭaj arboj. Ĝia pinto estis videbla tra la fenestroj de la kastelo, kaj kiam ĝi siluetiĝis kontraŭ ruĝa vespera ĉielo, aspektis kvazaŭ sopire ĝi rigardus malproksimen kaj dezirus troviĝi en lando de palmoj.

Ĉe la piedo de la altaĵo muĝetis roĝo super sablo kaj silikoj survoje al la lago. En la arbaro la roĝo havis bruan fluejon inter muskokovritaj ŝtonoj kaj centjaraj arbradikoj, sed ĉi tie ĝiaj bordoj ebeniĝis je herbotapiŝo, kie abundis blujaj, blankaj kaj ruĝaj floroj. Ĉi tie Erland ofte sidis, ĝoja pri pinsuro kaj soleco; ĉi tien li ankaŭ nun direktis siajn paŝojn por trinki freŝan akvon el la roĝo. Käck kaj Grip, la du hundoj, akompanis lin.

Atinginte la pinton de la altaĵo li haltis mirigita, ĉar li ekvidis ion neordinaran malsupre. Tie apud la roĝo sidis junulino. Li ne vidis ŝian vizaĝon, ĉar ŝi ne rigardis al li, sed li vidis karbonigrajn harbuklojn, fanditaj super nudaj ŝultroj kaj sur malhela vesto, kiu

estis ornamita per multkoloraj rubandoj. La junulino trempis jen unu piedon jen la alian en la akvon. Ŝi ŝajne gajigiĝis pri la freŝeco, eble ankaŭ pri la akvo-vezikoj, kiuj naskiĝis en tiu ludo. Kaj nun ŝi komencis kanti per laŭta, belsona voĉo, kiu ricevis reeĥon en la arbaro.

Kiu ŝi estis? Vilaĝana filino ŝi ne estis, tion Erland deduktis el ŝiaj gestoj, el ŝia vesto kaj el la kanto, kiu sonis tute alie ol la kantoj, kiujn la junulinoj en la regiono kantis, kiam ili en la profunda arbaro serĉis la brutaron. Sed kiu ŝi estis? Ĉu elfino aŭ ensorĉita princino. Silenta kaj miranta Erland staris sur la altaĵo, kaj en sia koro li sentis sekreton, neklarigeblan, teruran sed tamen allogan.

Sed Käck kaj Grip direktis al ŝi furiozajn okulojn kaj kolere murmuris. Kaj dum Erland staris droninta en rigardado kaj pensado, Grip ekkuris malsupren, kvazaŭ ĝi volus disŝiri la nekona-tulinon.

Tiam Erland ekvidis ŝian danĝeron kaj tuj revokis la hundon. Sed antaŭ ol tio okazis, la junulino rapidege sin turnis, ekstaris kaj precize kiam la hundo boris siajn akrajn dentojn

en ŝian jupon, ŝi puŝis ponardon en ĝian kolon. Kun peceto de ŝia jupo inter la dentoj la hundo ruliĝis al ŝiaj piedoj.

La okuloj de Erland flamegis pro kolerego, kiam li vidis la malfeliĉon de sia fidela Grip, kaj per rapidaj paŝoj li aliris kaj kriis:

— Kiu vi estas, kiu tion aŭdacis?

Sed la junulino per grandaj, nigraj, fulmantaj okuloj rigardis al la blonda grandsinjora filo, ŝiaj brunaj vangoj ruĝiĝis, la lipoj tremis, kaj la sangogutanta ponardon ŝi svingis tiel, ke la ruĝaj perloringoj ĉirkaŭ la nudaj brakoj tintadis.

— Ĉu vi volas mortigi min? ŝi demandis per akra voĉo, kiu havis fremdan akcenton.

Kaj defende ŝi levis la ponardon kontraŭ la alian hundon, kiu intencis ataki ŝin.

Erland ordonis al Käck kuŝiĝi, sed ĉar ĝi ne tuj obeis al la voĉo

de la mastro, Erland per la ĉasarko frapis la beston, tiel ke ĝi returniĝis blekante.

La okuloj de la gejunuloj renkontiĝis. La rigardoj de ambaŭ estis obstinaj. Sed kiel ajn, la lipoj de la junulino ekridetis.

— Mi ne timas vin, ŝi diris kaj ĵetis la ponardon, tiel ke siblante ĝi tranĉis la aeron kaj per la pinto fiksiĝis en arbo.

La kolero de Erland transiĝis en miron kaj scivolemon.

— Vi estas stranga junulino — sed estus malbone, se en viraj sportoj mi ne povus konkuri kun virino.

Li elingigis sian ĉastranĉilon kaj ĵetis ĝin kontraŭ la saman arbon. La tranĉilo penetris en la arbon apud la ponardo, sed tiom profunde, ke duono de la klingo kaŝiĝis en basto kaj ŝelo.

Li iris al la arbo kaj liberigis la du armilojn, lavis ŝian en la rojo kaj redonis ĝin al la posedantino.

— Vi estas bela junulino, li diris, sed tre neordinara ... Ĉu vi volas, li aldonis hezite, ke mi mortigu la alian hundon, ĉar ĝi koleras al vi?

— Ne, respondis la junulino kaj ŝovis la ponardon en la ingon, kiun ŝi portis ĉe la zono, la hundo estas senkulpa, ĉar tiuj bestoj estas tiaj, kiaj iliaj posedantoj volas, ke ili estu. Sed vi mem ŝajnas esti malmilda kaj malbona junulo.

Kaj la nekonatulino logvokis Käck, kiu je signo de sia mastro rampante promksimiĝis al ŝi. La junulino karesis ĝian hirtan kapon.

— Pardonu al mi, diris Erland, vi pravas: mi estas malmilda kaj malbona, sed ne kredu, ke mi incitis la hundon. Mi ne volis al via malbono.

— Mi volonte kredas al vi. Pli profunde ŝi rigardis Erlandon en la vizaĝon. Ĉu vi loĝas najbare?

— Jes.

— Adiaŭ, diris la junulino. Verŝajne ni ne renkontiĝos. Ŝi jam estis preta rapidi en la arbaron, kiam Erland, elreviĝante levis sian kapon kaj ekkriis:

— Ne, ne, haltu!

Li diris tion per tia tono, ke la nekonatulino turnis sin.

— Sciigu al mi vian nomon, diris la junulo kaj kaptis ŝian manon.

— Vi estas scivolema.

— Ne, mi ne interesiĝas pri via nomo, se vi nur volas sciigi al mi, de kie vi venas kaj kial ni ne plu renkontiĝos.

— Mia nomo estas Singoalla, de malproksime mi estas veninta kaj nenie mi restadas.

— Kaj sekve ni neniam renkontiĝos, ĉu?

— Kial vi okupiĝu pri mi? Jam morgaŭ vi estos forgesinta min.


— Ne, neniam mi forgesos vin.

Anstataŭ respondi Singoalla kliniĝis, ŝiris ruĝan floron, ĵetis ĝin en la rojon kaj kuris en la arbaron.

Erland staris sola. Lia rigardo ŝvebis post la malaperinta junulino. Tiel li staris dum momento, silenta, senmova, revanta. Fine li vekiĝis pro la bleko de Käck. Maltrankvile la hundo rigardis al sia mastro, ĉar ĝi ne kutimis vidi lin tia. Sed Erland surŝultrigis la ĉasarkon kaj malrapide supreniris la altaĵon.

**Viktor Rydberg**

*El la sveda tradukis  
Arvid Skoglund*



— Mi ne povas decidiĝi, ĉu mi nomu ĝin "Virino" aŭ ĉu mi igu ĝin pli simila al virino.

# John Einar Åberg: Ĉu ekzistas anĝeloj?

La ĉefoficejo de AS Haringo-&Fiŝobanko havas lokon en majesta kvinetaĝa domo, kiu plenas la kvartalon de strato al strato. La grundo estas grandega kaj la kvadratmetroj estas inter la plej kostaj en la urbo. Tiu ĉi palaco estas notita en la balancofolio de la banko je la valoro de unu krono.

Neniu devus timi pagi la duoblon.

La fenestrovitroj brilas klare poluritaj. La fasado estas el hakitaj ŝtonoj, kiuj nigriĝis pro vetero, vento kaj aĝo. Ĝi havas la formon de larĝbaza rektangulo kaj aspektas, precipe post pluvo, kiel kolerema pugno.

Sed la banko praktikas absolutan amikecpolitikon en sia reklamo.

Estas cetere malfacile konstrui domon, kiu aspektus kiel granda sino.

Kiam la okcidenta vento ŝetas sin de la maro sur la teron, la larĝa fasado de la banko devas akcepti unu el la unuaj frapoj. La ŝtormo ŝetadas sin senkomplete kontraŭ la glate poluritajn fenestrojn kaj batas per saloriĉa akvo sur ilin. Fukodoro enŝteliĝas internen tra la granda enirejo kun la klientoj. Kaj ne eliras.

La banko situas bone kaj por la haringoj kaj por la fiŝistoj. Kaj la ŝipposedantoj.

La banko situas apus la havenkanalo. Sur la strato inter la banko kaj la kanalo veturas tramoj. Unu post la alia ili alvenadas kaj kaŭzas bruon maltrankvilon sur la strato. Per strangaj tertremaj skuoj tiu maltrankvilo disvastiĝas de la kelo ĝis la subtegmentejo en la apudaj domoj.

Eĉ la fiera bankpalaco skuigiĝas.

La havenkanalo kondukas al la haveno, kiu malfermiĝas al la maro. De la fenestroj de la banko oni vidas tutan arbaron da mastoj kaj fumtuboj. Skuiĝanta arbaro, kiam la vento blovas.

La enirpordoj de la banko estas palace dignaj. Ili estas pezaj, kaj du homoj estas bezonataj por malfermi kaj fermi ilin.

Simbolaj reliefaj figuroj kovras la pordojn. Ili reprezentas virtojn, kiaj estas ŝparemo, laboremo, industriemo kaj honesto. Inter ili superregas honesto. Ĉiuj, kiuj eniras ĉi tien devas vidi ĝin.

Se oni klopodas eniri alie, oni aktivigas efikan ŝtelarmon. Plej taŭgas esti honesta!

Bernt Hagson estas pedelo en AS Haringo-&Fiŝobanko.

Li estas iniciatema kaj laborema. Ĉiun tagon inter la oka kaj duono kaj kvara li iras kun la manoj surdorse tien kaj reen en la banka enirejo kaj rigardas la pasantojn. Ofice li portas malhelan jaketon kun orumitaj butonoj kaj nigran kravaton. Ĉirkaŭ la dekstra mano li havas bendon, sur kiu estas skribite INFORMOJ.

Li estas cent okdek alta, ĉirkaŭ tridek jarojn aĝa, havas helan hararon kombitan malantaŭen kaj okulharojn, kiuj estas kelkloke tufaj. La okuloj estas bluaj kaj senesprimaj.

Multaj afablaj homoj kun pokerludo kiel profesio perdis grandajn sumojn je la senesprima rigardo de Hagson. Hagson estas rapidpensa, havas bonan memoron kaj povas esti kiel ajn

impertinente, se bezonate.


Li konas la plej multajn preterpasantojn. Sendknabojn li ne vidas, ili estas danĝera bando, kiun oni devas subpremi. Sendknabinoj estas iel malpli danĝeraj. Ilin li salutas per Ĉaŭ ĉaŭ bebulino! Bebulinojn, kiuj proksimiĝas al dudek, li alparolas per Bonan tagon, belulino! kaj tute laŭ la cirkonstancoj li okulumas, profunde riverencas aŭ rigardas impertinente.

Banksenditojn ambaŭseksajn, kiuj jam pasis la kritikajn jarojn, li salutas per levo de la dekstra montrofingro en la aeron.

Kiam la pli altranga klientaro ne prezentiĝas per sendito, sed venas en formo de ŝipposedanto, direktoro aŭ simile, oni kompreneble ne povas elbuŝigi Ĉaŭ ĉaŭ aŭ fari framasonan signon per dekstra montrofingro, sed riverencas bele kaj elegante. Ne tro malprofunde, ĉar tiam la potenculo povas ofendiĝi, sed ankaŭ ne tro profunde, ĉar malgraŭ ĉio oni reprezentas solidan entreprenon. Neniu servisteco, estas skribite en la oficregularo. Korekta ĝentileco.

Kiam Hagson pro sia laboro laciĝis en la kruoj aŭ kubutoj, li eniras budeton flanke de la enirejo. Super ĝi ankaŭ estas skribite INFORMOJ. Sub ĝia benko Hagson konservas termason, kiu vintre enhavas varman kafon kaj somere malvarman bieron. Sur la benko estas telefono kaj super ĝi pendas mistika folio.

dujuspikingliŝ — jes — ĝast e minit pliz 189  
ŝprehen zi dojĉ — ja (Skano) — moment bite 196  
palevufransé — vi vi misjé — in minit misjé 401  
abla usté espanjol — si — momento 510  
Larsson 161



La banko kompreneble havas eksterlandajn klientojn kaj tuj, kiam Hagson rimarkas iun, kiu aspektas eksterlande hezitema, li recitas sian parkeraĵon. Precipe kiam la haveno ricevas viziton de fremdaj turistŝipoj, la banko pleniĝas je homoj, kiuj volas ŝanĝi monbiletojn kaj ĉekojn, kaj Hagson, kiu opinias, ke estas amuze utiligi siajn lingvokononon, neniam perdas la okazon.

Se neniu el la mondlingvoj taŭgas, li scias tamen elturni sin. Li prenas la koncernen klienton je la brako, diras "Sekvu min!" kaj tiras la klienton al la giĉeto por fremda valuto.

— Pssst! li diras, okupiĝu pri ĉi tiu, li parolas neniun lingvon.

Kio poste okazas, ne estas lia afero.

Maldekstre de la enirejo situas la prunteprena sekcio. Buntaj aŝioj montrantaj gajajn kaj kontentajn homojn kaj instigantaj al gaja kaj kontenta ŝparado pendas je la muroj. Ĉe ĉiu giĉeto staras brile glata hejmsparujo. Neniu homo scias, ke la kasistoj, kiam ili ricevas ian tian agrablan ujeton en la manon, pensas: Diabla merdo!

Grandaj tabeloj sur la benko montras, kiel nekredeble mallonga tempo estas bezonata por ke kapitalo duobliĝu je kvarpocenta rentumo. Nur dek ses jaroj.

Pasis duona homaĝo de post kiam la prunteprena rentumo estis tiom alta.

Dekstre situas la kapitalsekcio. Pro pluraj kaŭzoj ĝi vekas malagrablon ĉe Hagson, kaj li preferas stari dorso al ĝi. Same kiel hela kaj gaja estas la ŝparkaso,

same tombe severa estas la kapitalsekcio. Tien ĉi eniras tiuj, kiujn ne allogas la vortoj pri celkonscia ŝparado je malalta rentumo, sed deziras havi altan dividendon je sia mono. Tien ĉi eniras ankaŭ la akciuloj, kiuj nek volas havi rentumon nek dividendon, sed profiton.

La kapitalsekcio estas trankvila fiŝakvo. Grandaj fiŝoj naĝas ĉi tie.

Duonŝtuparo kondukas al la bankhalo. La enirejo estas trankvila golfo kompare kun la ariganta hommaro de la bankhalo. Tajpiloj kraketadas, kalkuliloj tusadas kiel tbc-malsanuloj de longe malsanaj, la monernombriroj tintadas. La homoj laboras kiel idiotoj. La kasoj situas rekte antaŭe, maldekstre la eksterlandaj sekcioj, dekstre la pruntedonado. Malantaŭ apartaĵo maldekstre, pli ol homalta, situas la interkompensa sekcio. Ĉi tie interne kvin aŭ ses kalkuliloj mueladas la tutan tagon.

Ili estas prizorgataj de junulinoj. Ili faras pli ol dudek mil premojn po horo dum okhora labortago. Neniu metus viron al tia laboro.

Viroj havas animon.

Ĉe la pruntedonado laboras du homoj, kiuj ĝenas la trankvilon de Hagson: fraŭlino Margareta Günter kaj sinjoro Adolf Westin. Fraŭlino Günter estas pinupino kaj ŝi siblis al Hagson tre akre, ĉar li kuraĝis nomi ŝin bebulino. Li faris tion nur unu fojon.

Li riverencetas. Ŝi salutetas reen.

Westin estas alia individuo. Li turmentas la subulojn kaj komplezaĉas al la superuloj. Tuj,

kiam skribaĵo devas esti traktota de la direkcio, li akiras ĝin kaj surmetas sian nomosignon.

Se li povus meti sian nomosignon sur la necesejan paperon de la direkcio, li farus tion.

Dekstre en la enirejo estas ŝtuparo. Ĝi kondukas al la supraj etaĝoj kaj estas sociologia studo.

DIREKCIO estas skribite per grandaj literoj komence de la ŝtuparo, kaj sago montras supren laŭ la ŝtuparo. La literoj kaj la sago estas ĉizitaj el tropika ligno. La ŝtuparo estas larĝa kiel rivero, la materialo plej luksa marmoro. La ŝtupoj estas malaltaj kaj larĝaj kaj ŝirmitaj per dika ruĝa tapiŝo. Apogrelo ne ekzistas kaj ankaŭ ne estas bezonata. En niĉoj staras gajaj amoretoj. Ne, ne estas eble.

La demando nur estas, kio estas tio?

Estas tre eleganta ŝtuparo. Ĝi donas impreson de riĉeco, solideco kaj sekureco. La klientaro suriras ĝin kun ĝuo, la kontoristoj kun timema respekto. Ĝi kondukas al la pleja sanktejo: la direkcia etaĝo.

Longa larĝa koridoro, dika tapiŝo, kiu kaptas la plej etan paŝsonon: sankta silento. Malantaŭ kvin brunaj pordoj regas same multaj direktoroj, ĉiu kun speciala funkcio. Ili estas treege altaj sinjoroj. Sed ne senmortaj. La plej alta ĉefo nomiĝas Marcus. Lin oni nomas AD\* aŭ nur Marcus, sed neniam je rekta alparolo.

Kiel potencokolektivo la direkcio estas nomata "la dua etaĝo".

"La dua etaĝo ordonis, ke ..."  
"La dua etaĝo malpermesas, ke ...". Tutsame kiel "Downing Street diras" aŭ "Quay d'Orsay neas".

En la direkcia etaĝo troviĝas ankaŭ la sekretario. Ĝi gardas la plej profundajn sekretojn de la banko, ĝiaj kontoristoj havas absolute reteneman sintenon al la aliaj kontoristoj. La sekretoj de la sekretario estas konservataj en du ŝrankoj. La paperojn unu estas stampitaj "Sekrete", en la alia "Tre sekrete".

Oni neniam povas esti sufiĉe atentema.

Plej longe for laŭ la koridoro troviĝas la estrara ĉambro. Ĝi estas granda kiel dancosalono, havas pargetan plankon kaj pezajn ĉizitajn meblojn el kver-



-Kaj kion ni faros hodiaŭ?

\* AD = aganta direktoro

ko. En la brile polurita longa tablo speguliĝas belega kristala lustro. En la estrara ĉambro troviĝas la biblioteko de la banko. Unu mallongvando estas de la planko ĝis la plafono plena de libroj, kiuj estas konservataj malantaŭ vitro kaj ŝloso.

Nur du personoj havas aliron al ili. La kontoristo en la sekretario, kiu enigis la librojn, kaj la purigistino, kiu unu fojon po jaro polvosuĉas ilin.

Ĉirkaŭ la vandoj pendas portretoj, veraj mane pentritaj artaĵoj. Rimarkindaj viroj rigardas

suben. Ili ĉiuj havas ĝentilan rideton sur la lipoj kaj malvarmajn, durajn okulojn.

Ili ĉiuj okupis la prezidantan seĝon.

La ŝtuparo al la tria etaĝo ne estas eleganta, sed ĝi estas bela. Ĝi estas farita el pli simpla kalkŝtono. La tapiŝo, kiu estas io inter ornamo kaj taŭgo, ne sufiĉas por la tuta ŝtuparo, nur tiel longe kiel oni povas vidi de la dua etaĝo. En niĉo staras statuo. Oni ne povas vidi, kion ĝi reprezentas, sed oni divenas pri Merkurio. Ĉiuokaze ne estas iu

estrara prezidanto.

La tria etaĝo enhavas la antaŭkorton de la pleja sanktejo: la personarsekcion kun la personarĉefo. Kontisto Stenman estas potenca viro. Kiam regas senlaboreco, li estas diktatore malmoda, kiam mankas oficistoj, li estas demokrate aminda.

Li estas konjunktura folio. Sed li tremas nur antaŭ direktoroj.

La reviziado kaj librotendado najbaras la personarsekcion. Oni tuj rekonas kontoristojn el la reviziado pro ilia lontaneca rigardo kaj malrapida irado.

## På tredje året!


Nu börjar bokklubben NOVA LIBRO sitt tredje verksamhetsår. Medlemmarna i klubben har under de två gångna åren fått hem till sig ett urval av nya esperantoböcker: romaner, noveller, kåserier, en reseckildring, en deckare, ett seriealbum mm. Helt utan krångel. Under 1983 kommer det fler intressanta böcker. Var med dem som ska få dem!

### Ett enkelt system:

Du får den utvalda boken hem till dig. Med varje bok följer ett inbetalningskort. Vill du behålla boken betalar du inom 10 dagar. I annat fall skickar du tillbaka den inom 10 dagar. Du kan, om du vill, sälja boken till någon annan.

För att bli medlem behöver du bara skriva ett kort, där du säger att du vill vara med, och underteckna det. Du adresserar kortet till Esperantoförlaget, Bokklubben NOVA LIBRO, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.

**NOVA  
LIBRO** >>>



La koridoro malhavas tapiŝon, kaj la ŝtuparo al la supra etaĝo mallarĝiĝas. Ĝi estas iom malbela kaj foruzita. Ĝi memorigas pri ŝtuparo en malnova etburga domo. Ĝi premas vin al la vando kaj igas vin sopiri pri pizoj kaj varma punĉo. Ĝi kondukas al korespondado, enkovertigo kaj presejo. La enkovertigo en la mateno nomiĝas poŝtmalfermado.

La koridoro estas mallarĝa pasejo kun fuma plafono. La kontoristoj de la korespondado estas dividitaj en du grupoj, unu sveda kaj unu eksterlanda. Estas granda diferenco inter la du grupoj, estas tre distingite skribi *We credit you* anstataŭ *Vi krediterar Er*.

Sed ambaŭ grupoj estas same ruĝaj en la vizaĝo je la fino de la ofica tempo. Estas peza laboro.

La lasta ŝtuparo fine estas tutsimple ŝtuparo. Ĝi vekas nenian sentojn, ĝi nur plenumas utilan funkcion. Ĝi estas el simpla griza ŝtono kaj per tio rompas la naturleĝojn, ĉar ĉi tie la praroko kuŝas plej supre. Ĝi kondukas al stokejo, necesejoj, teraso, sociumejo kaj manĝejo. En la sociumejo estas unu gravuraĵo kaj unu triktrako kaj tablo kaj seĝoj por dekduo da personoj.

En la stokejo regas pedelo Jörgenson. Li estas alta viro kun sonĝokuloj. Li estas artamanto, iom nervoza kaj tre afabla. Liaj negocoj povus esti pli bonaj. Liaj fenestroj direktiĝas al la strato kaj haveno kaj li havas mirindan elrigardon.

La laboro estas malpeza dum tri jarkvaronoj. Nur dum la dua kvarono, kiam la jarmendoj de la kontoroj alvenas, li havas multan prilaboron.

Cetere li povas trankvili. Li havas kvietan hobion: kolekti cigarettumpojn kaj vicigi ilin sur la fenestro kaj ĵeti ilin sur la tramojn sube sur la strato. Ne estas multaj tramoj en la urbo, kiuj ne ĉirkaŭveturas kun la stumpoj de Jörgenson sur la tegmento.

Ili faras longajn vojaĝojn. Li mem iras nenien.

Nun vi scias multon pri la banko, kio ne kutimas troviĝi en iliaj jarraportoj.

**John Einar Åberg**

*El la sveda tradukis Franko Luin*



UPPTAKTSTRÄFF FÖR

FNS INTERNATIONELLA ÅR FÖR KOMMUNIKATION 1983

# Språket.

## Människans viktigaste kommunikationsmedel.

Lördag 29 jan 1983 kl 14-17

Karlbergsvägen 32, Föreningshuset

(T Odenplan, uppgång Västmannagatan)

Inledning av:

Erik Ransemar, författare:

Kommunikation sett ur konstnärlig skapande synpunkt

Åke Sandin, ordf i Svenska Freds 1977-79, lärare:

Fred, u-land, språk

Christer Kiselman, professor:

Vad är ett världsspråk

Ingemar Nordin, rektor:

Esperanto och skolan

Utställning, bokbord och kaffeservering

Arr.: Esperantoförbundet tillsammans med lokala esperantoföreningarna

Anmälan senast 20 jan till

Esperantoförbundet, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

tel 08-11 74 34 (må-to 17-19, lö 10-12)

## Kommunikation tema vid rumänskt uni- versitet

Som ett slags upptaktsmöte inför 1983-års Internationella år för kommunikation anordnade universitetet i Timisoara, i samarbete med läroorganisationer och den regionala skolförvaltningen en vetenskaplig diskussion om kommunikation i vetenskapens och fredens tjänst. En stor del av diskussionerna handlade om språkliga hinder i översättningar, på internationella konferenser och andra internationella arrangemang; och om behovet av ett internationellt språk.

Denna diskussion hade föregåtts av en liknande diskussionsrunda anordnad några månader tidigare av "Kollektivet Esperanto & Interlingvistik" vid Akademin för samhälls- och statskunskaperna.

Rumänien utmärker sig annars med mycket sparsamma nyheter vad gäller esperanto, trots att antalet esperantister i landet är tämligen stort och det inte saknas aktiviteter. Det är det enda landet i Europa med betydande antal esperantister men utan någon riksorganisation och utan organiserade internationella kontakter.

## Oomoto och esperanto under sextio år

Den japanska religiösa rörelsen Oomoto kunde under 1982 fira 90 år. 1983 kan den fira ett sextioårigt intresse för esperanto. Under sextio år har den japanska rörelsen använt sig av esperanto för att sprida sitt budskap utanför Japan, och samtidigt utbildat sina anhängare i esperanto. Oomotorörelsen finner likheter med esperanto,

eftersom de uppfattar sin religion som en bro mellan olika religioner, på samma sätt som esperanto fungerar som en bro mellan olika språk.


## Esperanto som brospråk

Vi har tidigare skrivit om den danska elektronikfirman Chr. Roving föreslag till Europeiska Gemenskaperna att utarbeta en lösning av översättningsarbetet mellan olika språk. Chr. Roving samarbetar med BSO (Buro voor Systeemontwikkeling), ett av de största nederländska företagen inom dataprogrammering, om detta projekt.

EG har beviljat de två företagen ett anslag att studera frågan teoretiskt. Som ni kanske minns, var en del av förslaget att man skulle använda sig av esperanto som "brospråk", vilket skulle drastiskt begränsa antalet varianter och underlätta översättandet överhuvudtaget.

Enligt BSO innebär valet av esperanto som "brospråk" stora fördelar på grund av det stora antalet användbara "etiketter" (prefixer, suffixer o dyl) och det relativt sett lilla antalet språkelement. Deras kalkyler har visat, att esperanto skulle innebära stora besparingar redan i inkodningen och sändningen av informationen.

Projektet kallas för DLT (distribuerad språköversättning, Dis-



tribuita LingvoTradukado på esperanto) och består av två delar: översättning till esperanto och vidare till nationella språk. Det riktar sig inte direkt till EGs behov, utan till informationskonsumenterna i allmänhet och skulle ingå i en kommande vardag. Ett exempel: före avresan vill familjen Olsson ta reda på väderprognosen för södra Frankrike. Denna väderprognos finns i en databank, översatt till esperanto. På ett tangentbord kopplat till hemmets teveapparat får familjen Olsson prognosen fram på bildskärmen, men på svenska.

Meningen är att översättningen till esperanto och från det till nationalspråken skulle ske helt automatiskt, den senare hemma hos informationskonsumenten, som skulle ha en liten "översättningsdator" bredvid sin teveapparat. Denna dator skulle, på grund av stora produktionsvolymer, vara mycket billig. Den skulle också göra det möjligt att själv välja det språk till vilket man vill ha meddelanden översatta.

Användningsmöjligheterna kan vara mycket större än antytt i exemplet ovan. Nyhetsprogram och filmer i teve kan automatiskt förses med texter på esperanto för att sedan hos användaren automatiskt översättas till önskat språk.

BSO undersöker de programmässiga aspekterna av frågan, medan Chr. Roving försöker tänka ut maskinvaran. Flera konsulter vid olika europeiska universitet är kopplade till projektet, liksom Internationella Esperantoförbundet UEA.

BSO och Chr. Roving hoppas att förundersökningen, finansierat alltså av EG, ska ge tillräckliga argument för större medelanslag nästa år. Det skulle gälla i så fall utarbetandet av en praktisk lösning.

Om projektet får fortsätta innebär detta inte alls någon "seger" för esperanto, men väl ett oerhört starkt stöd för esperantisternas argument.